

## Enhavo

1	Pasintaj aranĝoj.....	2
1.1	Simpozio pri Lingvo kaj Egaleco (Humphrey Tonkin).....	2
1.2	Pri multlingvismo en Ĝenevo (Federico Gobbo).....	3
1.3	Interlingvistiko kaj historio de informadiko (Federico Gobbo).....	4
1.4	Interlingvistikaj aranĝoj dum la 99-a UK en Buenos Aires.....	5
1.4.1	La 37-a Esperantologia Konferenco .....	5
1.4.2	<i>Michele Gazzola</i> en la 67-a IKU .....	5
2	Symposium “Economics, Linguistic Justice and Language Policy” .....	5
3	Bibliotekoj kaj arkivoj.....	6
3.1	La Kulturpremio de Aalen al <i>Utho Maier</i> kaj <i>Karl Heinz Schaeffer</i> .....	6
3.2	KAEST 2014 pri bibliotekoj kaj arkivoj.....	6
3.3.	Kiom da esperantaj bibliotekoj ekzistas en la mondo? .....	7
4	Bibliografioj .....	7
4.1	Aktuala Bibliografio 4 (Detlev Blanke).....	7
4.2	Bibliografia aldono al Stojan.....	10
4.3	Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj de <i>Bernhard Pabst</i> .....	10
4.4	Katalogo de artikoloj el Esperanto-periodaĵoj de <i>Tom Arbo Høeg</i> , <i>Douglas Draper</i> kaj <i>Andrej Grigorjevskij</i> .....	10
5	El universitatoj kaj altlernejoj .....	11
5.1	Novaĵoj el la Interlingvistikaj Studoj de UAM (Ilona Koutny).....	11
5.2	Universitato de Duisburg-Essen: <i>Marcos Cramer</i> pri planlingvoj.....	13
5.3	Bakalaŭra disertacio pri “artefaritaj lingvoj” de <i>Blanka Ĉapkova</i> .....	13
6	<i>Scienca Revuo</i> en la reto.....	13
7	Necesas fakaj artikoloj pri Esperanto en naciaj lingvoj (Humphrey Tonkin).....	14
8	Interlingvistika Fonduso de CED (CED-Fonduso) .....	14
9	Personaj bibliografioj .....	16
9.1	<i>Christer Oscar Kiselman</i> .....	16
9.2	<i>Marcos Cramer</i> .....	19
9.3	<i>Ignat Florian Bociort</i> okaze de la 90-a naskiĝtago .....	21
10	Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto de <i>Bernhard Pabst</i> .....	23

# 1 Pasintaj aranĝoj

## 1.1 Simpozio pri Lingvo kaj Egaleco

Novjorko, mardon, la 29-an de aprilo 2014

La simpozio, ĉe Church Center, 777 United Nations Plaza, Novjorko, okazis sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), la Laborgrupo pri Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj la Universitato de Hartford. Universala Esperanto-Asocio rolis kiel la gastiga organizaĵo, kun parta subvencio de Esperantic Studies Foundation. UEA kaj CED jam en pasinteco organizis similajn aranĝojn, plej laste antaŭ du jaroj.

**Aliĝoj.** Entute 83 personoj aliĝis, el kiuj 14 ne ĉeestis. Plia seso da homoj ĉeestis individuajn partojn de la program sen aparta aliĝo. Inter la aliĝintoj estis reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, oficistoj de UN, universitatoj, profesiaj tradukistoj, anoj de UN-misioj, kaj aliaj lingvolaboristoj.

**Malfermo.** Malfermis la programon: Lia Ekscelenco *Filippe Savadogo*, Ambasadoro kaj Konstanta Reprezentanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj de la tutmonda komunumo de parolantoj de la franca lingvo, la tielnomata Frankofonio; kaj sinjorino *Françoise Cestac*, iama Asista Ĝenerala Sekretario de UN pri Konferencaj Servoj. *Humphrey Tonkin*, de la Universitato de Hartford, iama prezidanto de UEA, prezidis la simpozion.

**Inaŭgura parolado.** La inaŭguran paroladon prezentis *Mark Fettes*, de la Universitato Simon Fraser, Kanado, nuna prezidanto de UEA, kiu emfazis la gravecon de la lingvoj kiel faktoro en internaciaj aferoj ĝenerale kaj daŭripova evoluigo specife. Li atentigis, ke UN donas malmultan atenton al lingvaj demandoj. Tiu manko de atento kondukas al ĝia emo, en multa ĝia laboro, funkcii desupre malsupren anstataŭ demalsupre supren.

**Referaĵoj.** Entute, dekdu pliaj referaĵoj estis prezentitaj de fakuloj kaj aktivuloj el ses landoj:

*Lisa McEntee-Atalianis*, de la Londona Universitato, alfrontis problemojn en la apliko de la oficiala multlingvisma politiko de UN, specife en la ekzemplo de la Internacia Martrafika Organizaĵo.

*Britta Schneider*, de la Libera Universitato Berlino, esploris la simbolajn funkciojn de la lingvoj preter etnaj demandoj, donante apartan atenton al popularaj uzoj de lingvoj, precipe en populara muziko.

*Terrence G. Wiley* kaj *M. Beatriz Arias*, de la Centro por Aplika Lingvistiko (Washington, DC), ekzamenis la limigojn truditajn al edukado kiel homa rajto pro neegaleca lingva leĝfarado kaj praktiko en Usono.

*Esther Schor*, de la Universitato Princeton, retrorigardis al la fondiĝo de la Esperanto-movado fine de la deknaŭa jarcento kaj komence de la dudeka, en la kadro de la debato inter liberalaj memportataj rajtoj kaj la rajtoj de komunumoj.

*Yael Peled*, de la Universitato de Montrealo kaj la Universitato McGill, ekzamenis la temon “Egaleco plurale: La lingvo kaj kompleksa egaleco,” en kiu ŝi pridemandis la terminojn *lingvo* kaj *egaleco*, montrante misperceptojn eventuale proprajn al ambaŭ.

*Daniel Ward*, redaktoro de la usona periodaĵo *Language Magazine*, traktis la problemon de mondlingva edukado en la angleparolanta mondo, kie en lernejoj kaj universitatoj lingvostudado daŭre falas, precipe en Usono.

*Helder de Schutter*, de la Katolika Universitato Leuven kaj la Universitato Princeton, esploris la implicojn de mondo, en kiu la proprietado de la angla lingvo transiras al dualingvaj parolantoj, kies neegaleca rilato al la angla naskas eventualajn nejustaĵojn.

*Rosemary Salomone*, de St. John's University, Usono, alfrontis la implicojn de la kreskanta emo de universitatoj en neangleparolantaj landoj proponi edukadon en la angla, precipe en postdiplomaj studoj.

*Anshuman Pandey*, de la Universitato de Miĉigano, esploris tutmondajn komputajn normojn por lingvoj kaj skribsistemoj kaj la defiojn en klopodoj krei ekvilibrantan ĉirkaŭaĵon por uzantoj de ĉiuj lingvoj.

*Eva Daussà*, de la Ŝtata Universitato de Novjorkio, Buffalo, proponis la ekzemplon de la kataluna kiel granda minoritata lingvo en pli vasta ŝtata kunteksto, kaj la malfacilaĵojn en kreo de egaleca lingvopolitiko, kiu konservas kaj plifortigas la minoritaton.

*Dipika Mukherjee*, de Universitato Northwestern, ekzamenis religian identecon en rilato al lingvoj en Malajzio, montrante, ke oni nesufiĉe frontas la rilaton inter lingvo kaj religio, kaj atentigante, ke en Malajzio okazis falo en la rolo de la angla kiel interlingvo.

*Andrea Schalley* kaj *Susan Eisenclas*, de Universitato Griffith, Aŭstralio, atentigis, ke en Aŭstralio la enlandan kreskon de multlingveco akompanas kvalita falo de la aranĝoj por tia multlingveco.

**Ferma sesio.** Fine, *Mark Fettes* gvidis ĝeneralan diskuton pri “tagordo por esploroj pri lingva egaleco.” Unu el la elementoj en tia tagordo, laŭ iuj partoprenantoj en la ofte vigla diskuto, devas esti esploro de la lingva situacio ene de UN mem.

**Video.** *Ksenia Prilepskaja* kaptis plurajn referaĵojn videe kaj ankaŭ intervjuis plurajn partoprenantojn.

**Venontaj paŝoj.** Oni esperas, ke iuj referaĵoj el tiu ĉi eksterordinare produktiva simpozio povos esti kolektitaj kaj eldonataj. Oni nun diskutas tiujn eblecojn. Oni ankaŭ diskutas vojojn por aktivigi la Laborgrupon pri Lingvoj ĉe UN cele al alfronto de iuj demandoj supre menciitaj.

Por ligi al la raporto pri la simpozio, uzu jenon:  
[www.languageandtheun.org/events.html](http://www.languageandtheun.org/events.html)

*Humphrey Tonkin*

## 1.2 Pri multlingvismo en Ĝenevo

La projekto RECODE estas iniciato Eŭropa-Kanada por esplori la politikojn de multlingvismo en plurnaciaj suverenaj ŝtatoj, kiel EU, Kanado kaj Svislando, financitaj de European Science Foundation (ESF). [1] Ĝi komenciĝis en Junio 2010 kaj finiĝis en Novembro 2014. La konferenco, okazinta en 19-20 Junio 2014 ĉe la Universitato de Ĝenevo estis la 7-a kaj la antaŭlasta kadre de la tuta projekto. Ĝi celis arigi konatajn fakulojn pri tiu

temo en Eŭropo kaj Kanado. Fakte, prelegantoj estis rekte elektitaj laŭ invito de la organizantoj, *François Grin* (Ĝenevo) kaj *Peter A. Krause* (Augsburg).

En la unua grupo estis diskutita la rilato inter multlingvismo kaj la konstruado de identeco. Evidentiĝis la centra rolo de multlingvaj grandaj urboj, kiel ekzemple Bruselo, en la formado de nova multlingva konscio, kie homoj nur vivas por kelkaj jaroj, kaj dume tenantaj kontaktojn kun la devena lando.

La konceptoj de neporĉiama migrado kaj tiu ĉi ŝanco daŭre kontakti familianojn kaj geamikojn puŝas nin repensi la konceptojn de identeco. Krome, la teknologiaj povoj, ekzemple en la internacia movado de la 'indignados', kiuj grupiĝis per Tvitero (Twitter) kaj aliaj sociaj retoj, bezonas pli da atento.

La dua grupo de prelegantoj diskutis ĉefe la tension inter la emo konservi multlingvismon kaj la risko perdi unu aŭ pli da lingvoj, ĉar konsiderita(j) neutila(j) aŭ nevaloraj de la parolanto(j). Multa diskuto, kiel antaŭvideble, alvenis kiam oni enkondukis en la diskuto la esprimon *English as a Lingua Franca* (ELF).

Tie, alvenis demandoj al la subskribinto, ankaŭ dum la kafopaŭzoj, pri la lingva statuso de Esperanto.

Preskaŭ ĉiuj samopiniis pri la netaŭgeco de nuranglalingva Eŭropo -- notinda escepto estis *Gluyn Morgan*, (Syracuse / Collegio Regio Torino) -- sed ankoraŭ nebulas konkreta politika strategio por subteni konkrete multlingvan EU. Interesaj konceptoj estas lingva justeco kaj lingva malsekureco, kiuj povas utili por mezuri la efikecon de la politikoj subtene al multlingvismo. Multaj planoj estas faritaj por daŭrigi la esploradon post la konkludo de la projekto RECODE, aparte en la kadro de EU-fondita projekto MIME (Moviĝo kaj Inkludo en Multlingva Eŭropo), kie multaj prelegantoj membras [2].

[1] Pli da informoj en la angla: <http://www.recode.info>.

[2] Pli da informoj: <http://www.mime-project.org/>. La retejo estas provizora.

*Federico Gobbo*

### 1.3 Interlingvistiko kaj historio de informadiko en Budapeŝto

En 23-27 Junio 2014 en Budapeŝto okazis la deka sesio de la konferenca serio „Komputebleco en Eŭropo“. Temas pri unu el la plej gravaj nuntempaj konferencoj, kie kunvenas teoriaj informadikistoj, kun aparta atento al la fundamentoj. Pro tio speciala sekcio estas dediĉita al la historio kaj filozofio de informadiko, lige al la asocio HAPOC.

*Federico Gobbo* prezentis du komunikojn kun du diversaj kunaŭtoroj. Unu el ili kun *Helena Durnova* (Universitato Masaryk, Ĉeĥio) celis prezenti la rilatojn inter la klasika interlingvistiko, t.e., la strebo trovi la definitivan formon de internacia helplingvo, kaj la Hilberta programo. Ambaŭ estis lanĉitaj en Parizo en jaro 1900 fare de filozofoj kaj matematikistoj, kiuj iel okupiĝis pri la temoj. Aparta atento estis dediĉita al *Louis Couturat*, *Giuseppe Peano* kaj *Bertrand Russell*. Interese, en la 1950aj jaroj la strebo trovi universalan programlingvon por la novaj komputaj maŝinoj, kiu nomiĝis ALGOL, en la tiutempa Ĉeĥoslovakio estis nomita “la Esperanto de la programlingvoj”.

Pliaj detaloj troviĝas ĉe la oficiala retejo de la kunveno (en la angla):

<http://cie2014.inf.elte.hu/>

HAPOC = History and Philosophy of Computing <http://hapoc.org/> por detaloj.

*Federico Gobbo*

## **1.4 Interlingvistikaj aranĝoj dum la 99-a UK en Buenos Aires (Bonaero)**

### **1.4.1 La 37-a Esperantologia Konferenco**

Kadre de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto en Buenos Aires (26.07.-02.08.2014) okazis la 37-a Esperantologia Konferenco. Ĝin preparis kaj gvidis *prof. Esther Schor*, fakulo pri la angla literaturo ĉe la Universitato de Princeton, Usono, kaj *José Antonio Vergara*, estrarano de UEA.

Estis prezentitaj jenaj prelegoj:

*D-ro Marcos Cramer*: Ĉu tamen eblas pri-Esperanta lingvoscienco?... aŭ kiel difini, kiuj estas la kompetentaj parolantoj, kiuj determinas la lingvan regularon?

*Prof. D-ro Esther Schor*: Zamenhof kaj la Liberala/Komunuma Debato

*Prof. D-ro Christer Kiselman*: Akademio de Esperanto fronte al novaj taskoj.

*D-ro Maciej Jaskot*. Ĉu veraj aŭ falsaj amikoj? Leksikaj (mal)koincidoj en la tradukado inter la hispana kaj Esperanto.

### **1.4.2 Michele Gazzola en la 67-a IKU**

Kadre de la 67-a Sesio de la Internacia Kongresa Universitato jena prelego estis de interlingvistika intereso:

*D-ro Michele Gazzola*: Lingva justeco: Kiel taksi ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio.

## **2 Symposium “Economics, Linguistic Justice and Language Policy”**

### **CALL FOR PAPERS**

**Humboldt-Universität zu Berlin, School of Business and Economics  
Berlin, Germany, 2-3 March 2015**

#### **Theme**

The range of problems raised by diversity of languages in international economic and political integration processes calls upon innovative, efficient and fair language policies to manage multilingualism. Language policies are increasingly acknowledged as being a necessary component of many decisions taken in the areas of labour mobility, access to knowledge and higher education, social inclusion of migrants, and they can affect companies' international competitiveness and the democratic control of international organisations.

The symposium "Economics, Linguistic Justice and Language Policy" aims at bringing together economists, philosophers, applied linguists and sociolinguists, policy makers, legal scholars, and social scientists in general. The purpose is to discuss, from an interdisciplinary perspective, the socio-economic effects of language policies, the impact of language dynamics and language planning on justice and inequality at the national or international level, as well as the connection between democracy, decision-making and linguistic diversity.

Prospective participants are invited to submit an abstract on one of the following or related topics:

1. Theoretical models of linguistic justice and linguistic democracy (e.g. minority languages, immigrants, supranational integration, higher education).
2. Assessment of the socio-economic consequences of linguistic diversity, language policies and dynamics.
3. Evaluation of the costs, benefits and the fairness of language policies.
4. Languages, linguistic rights and power.
5. Multilingualism and economic activities.

### **Keynote speakers**

- Jean-Claude Barbier (Centre d'économie de la Sorbonne, Université Paris 1 Panthéon Sorbonne, Paris, France)
- David Robichaud (Department of Philosophy, University of Ottawa/Université d'Ottawa, Canada)

### **Organisers**

- Bengt-Arne Wickström, Humboldt-Universität zu Berlin
- Michele Gazzola, Humboldt-Universität zu Berlin

### **Date and Venue**

2-3 March 2015

Humboldt-Universität zu Berlin, School of Business and Economics, Spandauer Straße 1, DE-10178, Berlin, Germany

### **Submission and deadlines**

The length of abstracts should not exceed 350 words. Abstracts must be submitted to the address "gazzola [at] hu-berlin.de" by the 30th November 2014. The successful applicants will be notified by the 15th December 2014.

**Website:** <http://www.wiwi.hu-berlin.de/justice>

**Participation fee:** € 100,-.

**With the support of:** WWG - Wirtschaftswissenschaftliche Gesellschaft

*(Informo de Bengt-Arne Wickström)*

## **3 Bibliotekoj kaj arkivoj**

### **3.1 La Kulturpremio de Aalen al *Utho Maier* kaj *Karl Heinz Schaeffer***

La germana „FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj“ kaj la urbo Aalen per la “14-a Esperanto-Kulturpremio de Aalen” distingis la ĉefajn aktivulojn de Germana Esperanto-Biblioteko (GEB) *Utho Maier* (direktoro de GEB) kaj *Karl Heinz Schaeffer* (Afergvidanto de GEB).

La GEB troviĝas en la urba biblioteko de la sudgermana urbo Aalen (federacia lando Badeno/Vurtembergio) kaj estas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo (2013. 23.500 libroj kaj 2.450 periodaĵoj). Kiel institucio ĝi ekzistas ekde 1908. En 1989 ĝi iris al Aalen.

La premiigo okazis la 30.03.2014 en Aalen. La urbestro de Aalen, *Thilo Rentschler* bonvenigis la gastojn kaj *Gerhard Walter*, la urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg, faris la laŭdparoladon pri la laŭreatoj. La antaŭan tagon dum solenaĵo pro la 25-jariĝo de Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen la festparoladon faris d-ro *Detlev Blanke* pri la temo “Esperanto (mal)sukcesinta eksperimento? Kelkaj rimarkoj pri reala utopio”.

### **3.2 KAEST 2014 pri bibliotekoj kaj arkivoj**

La tradicia **Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST)** de 13.-16. novembro 2014 okazos en la slovakia urbo Modra Harmonía (30 km distanco de Bratislavo,

90 km de Vieno). La kadra temo estos „Arkivoj kaj Bibliotekoj – kiel ni protektos nian heredaĵon? Informoj troveblas ĉe <http://kaest.ikso.net/>

### 3.3 Kiom da esperantaj bibliotekoj ekzistas en la mondo?

Ne estas klare kiom da esperantaj bibliotekoj (= kolektoj, arkivoj, muzeoj) ekzistas en la mondo.

La unuan superrigardon verkis la kroato *Marinko Ĝivoje* 1980 (Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj. Zagreb: Aŭtoro).

La hungaro *Árpád Máthé* kadre de la esperantologia konferenco 1992 (77-a UK en Vieno) prezentis informojn, kiujn li kolektis pri 99 bibliotekoj.

La belgo *Roland Rotsaert* iniciatis kaj administras la aktivan diskutgrupon bibliotekoj@googlegroups.com, per kiu li fine de 2013 sukcesis kolekti informojn pri 39 bibliotekoj en 17 landoj (16.12.2013). Intertempe la nombro plue kreskis.

La jarlibro de UEA 2014 mencias entute nur 18 bibliotekojn. Interesa ankaŭ estas la disdivido de la bibliotekoj laŭ landoj. Menciindas la kvanto en neeŭropaj landoj:

	Ĝivoje 1980 -	Máthé 1992 -	UEA 2014 -	Rotsaert 2013
Kolektoj entute	30	99	18	39
Landoj	21	31	14	17
En Germanio	3	8	4	8
En ekstereŭropo	4	7	2	5

Pri la problemoj de Esperanto-bibliotekoj ankaŭ vidu:

Blanke, Detlev (2009, Red.): *Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj. Aktoj de la kolokvo en Vieno, 19-20 oktobro 2007*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2009, 83 p. (kun kontribuoj de *Herbert Mayer, Detlev Blanke, Utho Maier, Karl Heinz Schaeffer, Christian Cimpa, Árpád Máthé, Reinhard Haupenthal, Miroslav Malovec, Marek Blahuš, Barbara Pietrzak*).

Menciindas ankaŭ la pritema serio de *Utho Maier*, direktoro de la germana Esperanto-Biblioteko en Aalen en “Esperanto aktuell” ekde 5/2011, la organo de Germana Esperanto-Asocio.

## 4 Bibliografioj

### 4.1 Aktuala Bibliografio 4

(Kp. la unuajn tri partojn de la Aktuala Bibliografio en IpI 86, 87 kaj 88-89.)

Aragón, Alfredo (2013). *Muzika Terminaro. Alfronto al la tutmonda problemo pri kaoso en muzika skribado*. (2a eldono reviziita). São Paulo: Associação Paulista de Esperanto, 100 p.

\*Baláž, Peter (2010/11): “Slovak Online – interreta paĝaro por lerni la Slovakian lingvon.” → *Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information*. (Poznań) 5/2010-2011: 63-68.

\*Blahuš, Marek (2010/11): “Language Learning Through the Internet. Nine Years of Experience.” → *Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information*. (Poznań) 5/2010-2011: 49-61

- Blanke, Detlev (2014): “Kio estas GIL?”→ *La Ondo de Esperanto*, 4-5/2914, p. 13.  
(pli ampleksa versio en: <http://sezonoj.ru/2014/06/235gil/>)
- Blanke, Detlev (2014): „Zeitschrifteninhalte erschließen: Vorbildlich für „Esperantisto Slovaka“.”→*Esperanto aktuell* 33, n-ro 2/2014, p. 12.
- Cherpillod, André (2014): *Reformoj? Kien ili kondukos nin?* Courgenard: La Blanchetière, 15 p.
- Cordonú, Ricardo (2014): *D. Bonifacio Sotos Ochando, El Doctor Zamenhofy los idiomas de su invención. Datos bibliográficos relativos al proyecto de lengua universal de Bonifacio Sotos Ochando.* Herausgegeben, mit einem Nachwort und einer Bibliographie versehen von Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Edition Iltis, 26 p.
- Camacho, Jorge (2014): “Motivoj por ne kabei.”→*Beletra Almanako* 19: 73-82.
- Daŝgupto, Probal (2014): “La poezio de Jiří Karen.”→*Beletra Almanako* 19: 108-120.
- Degoul, Francisko (2013): “Homaranismo: ĉu li misis tro mie?” .→*Literatura Foiro* 44, n-ro 266: 284-298.
- \*Dols Salas, Nicolau (2012): “Phonology and morphology and the limits of freedom in an artificial language.”→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 7/012: 37-52.
- Halperin, Liora R. (2012): “Modern Hebrew, Esperanto, and the Quest for a Universal Language.” →*Jewish Social Studies*, Vol. 19, no 1, Fall, 1-33.  
([http://www.liorahalperin.com/uploads/5/1/5/7/5157561/modern\\_hebrew\\_esperanto\\_quest\\_for\\_a-universal\\_language\\_halperin\\_jss\\_fall\\_2013.pdf](http://www.liorahalperin.com/uploads/5/1/5/7/5157561/modern_hebrew_esperanto_quest_for_a-universal_language_halperin_jss_fall_2013.pdf))
- Haupenthal, Irmi/ Haupenthal, Reinhard (2014): *Plansprachensammlung Haupenthal. Neuerwerbungen 2013.* Bad Bellingen: Edition Iltis, 20 p.
- Haupenthal, Reinhard (2014): *Geplante Veröffentlichungen. Planataj Publikigaĵoj.* Bad Bellingen: Edition Iltis, 16 p.
- Haupenthal, Reinhard (2014): *Die Plansprache Volapük in Archiven und Bibliotheken. Bestandsaufnahme und Desiderate.* Bad Bellingen: Edition Iltis, 40 p.
- Kee, Dennis (2014): „La subfakoj de merkatico, aplikataj al la Esperanto-movado.“ Parto 1.→*La Ondo de Esperanto*, 4-5/2914, p. 3-4.
- \*Keller, Stefano / Skutnabb-Kangas, Tove (2013): “Linguistic Human Rights System, and the Universal Esperanto Association’s work on Language Rights.”→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 8/2013: 150-172.
- \*Kimura, Goro Christoph (2013): “Strategie komunikacji językowej na polsko-nemieckim pograniczu.”→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 8/2013: 109-124.



\*Koutny, Iona (2012): "From semantic networks to dictionary structures."→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 7/2012: 115-128.

\*Koutny, Iona (2013): "Rezension: Brosch, Cyril & Fiedler, Sabine (eds) 2011: *Florilegium Interlinguisticum. Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag.* Frankfurt am Main: Peter Lang. ISBN 978-3-631-61328-3, 424 p."→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 8/2013: 173-177.

Krause, Bernd (2014): "Al la rememoro de Leopold Einstein. Ein Nachrufgedicht von Leon Zamenhof (1922)."→*Esperanto aktuell* 33, n-ro 2/2014, p. 16-17.

Lins, Ulrich (2014): „La du flankoj de Ivo Lapenna.“→*Beletra Almanako* 19:121-137.

Maier, Utho (2014): „Otto Dix – Esperanto-Grüße aus dem 1. Weltkrieg?“→*Esperanto aktuell* 33, n-ro 2/2014, p. 14-15

Minnaja, Carlo (2014): "Umberto Eco."→*La Ondo de Esperanto*, 4-5/2014, p. 20.

\*Ó Riain, Seán / Reinvar, Jozef (2011): "Information on Civil Society Platform on Promotion of Multilingualism and its Recommendations."→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 6/2011: 23-32.

Papazov, Dimitar (2013): *El mia verda vivo. Rememoroj de esperantista kaj socia aganto.* (Okaze de la 125-a jariĝo de Esperanto). Berlino-Sofio (Sofio: Dafna), 219 p. (Enkondukis, redaktis kaj produktis Detlev Blanke.)

(Dimitar Papazov estis ĝenerala sekretario de Bulgara Esperanto-Asocio. Laŭ la supra manuskripto aperis la bulgarlingva traduko: Papazov 2014).

Papazov, Dimit'r (2014): *Zelen Život.* P'rovo izdanie v Berlin, Germanija, 2013 godina „El mia verda vivo“. Sofia: Narodno Ĉitaliŝce „Interkultura 21 vek -2006“, 271 p. + fotoj)

Pokrovskij, Sergio (2014): „Okazo kaj kazo.“→*La Ondo de Esperanto*, 4-5/2014, p. 16-19.

\*Reinvar, Jozef (2011): „Potreba zásadnej zmeny doterajšej jazykovej a kultúrnej Politiky EÚ: výzva pre Vyšehradské krajiny (V4). The Need for Radical Change in Traditional EU Language and Cultural Policy: A Challenge for the Visegrad Countries (V4).“→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 6/2011: p. 33-43.

Shibata Iwao, Gotô Hitoshi, Mine Yoshitaka (2013, red.): *Nihon esuperanto jinmei jiten. Biografia Leksikono de la Esperanto-Movado en Japanio.* Tôkyô: Hitsuji shobô, xiii, 654 p. (Vd. la recenzon de Ulrich Lins en *IntI* 90, p. 6; *IpI* 88-89, p. 8).

Sidorov, Anatoli V. (2014): *Ĝesperanto-dviĝenio na Severo-Zapade Rossii.* Sankt-Peterburg: Sidorov, 160 p. (Esperanto-movado en Nord-okcidenta Eŭropa parto de Ruslando)

\*Strida, Ida (2013): "Classifications of artificial languages."→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 8/2013: 125-132.

\*Tonkin, Humphrey (2012): "Language Rights and Linguistic Justice."→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 7/2012: 9-22.

Waringhien, Gaston (2013): “Emile Grosjean-Maupin.”→*Literatura Foiro* 44, n-ro 265: 240-243.

\*Wojan, Katarzyna (2013): “Esperanto w leksykografii polskiej. Bibliografia Słowników za lata 1888-2012.”→*Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information.* (Poznań), 8/2013: 133-149.

Żelazny, Walter (2013); “Esotera konflikto inter Marko Zamenhof kaj la filo Ludoviko.”→*Literatura Foiro* 44, n-ro 265:228-235.

\*) Tiujn tekstojn eblas trovi ĉe <http://jki.amu.edu.pl>.

*Detlev Blanke*

## **4.2 Bibliografia aldono al Stojan**

Kiel konate, la klasika bibliografio de Petr E. Stojan el la jaro 1929 estis represita de la eldonejo Olms kun bibliografia aldono:

*Stojan, Petr E. (1929/1973): Bibliografio de Internacia Lingvo. Kun bibliografia aldono de Reinhard Haupenthal. Hildesheim: Olms, 561 p. (Unua eldono: Genf : Universala Esperanto-Asocio 1929).*

Kiel mi nur nun eksciis, por siatempe planita tria eldono ĉe Olms Reinhard Haupenthal liveris kompletigitan bibliografian aldondon. La tria eldono de Stojan bedaŭrinde ne realiĝis pro manko de sufiĉa intereso. Tamen la bibliografia aldono troviĝas en la retejo de la eldonejo Olms:

<http://www.olmsonline.de/purl?PPN519439384> Tie aperos PDF-dosiero sub „Bibliographischer Nachtrag” (04.09.2014).

## **4.3 Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj de Bernhard Pabst**

Pri sia ege valora projekto de Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj (EBEA) la aŭtoro siatempe raportis en la aktoj de GIL::

*Pabst, Bernhard(2003): EBEA: Retrobibliographierung nichtmonographischer Literatur zum Esperanto. En: Blanke, Detlev (red.): Plansprachen und elektronische Medien. Interlinguistische Informationen, Beiheft 9. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL), p. 64-76.*

Ĝis 2011 ekzistis teksto pri EBEA kaj ligo al la datum-banko sur la retpaĝo de GIL. Post tio ĝi troviĝas ĉe: <http://www.esperantoland.org/ebea/>.

Dum la lasta tempo, kiel la aŭtoro informis, li bedaŭrinde ne plu aktualigis la bibliografion. UEA lanĉis similan projekton, vidu **4.4**.

## **4.4 Katalogo de artikoloj el Esperanto-periodaĵoj de Tom Arbo Høeg, Douglas Draper kaj Andrej Grigorjevskij**

En la katalogo, kiu estas alirebla sur la retejo de Universala Esperanto-Asocio, estas registritaj artikoloj, aperintaj en pluraj Esperanto-periodaĵoj por diversaj jaroj.

Ĉi tiun kolekton de artikoloj unue faris Tom Arbo Høeg (1926-1992), laŭ modelo de simila katalogado de norvegaj artikoloj en la Universitata Biblioteko de Oslo (kie li mem estis sekciestro). Kun kelkaj helpantoj en Norvega Esperanto-Ligo li registris plejparton de la artikoloj ĝis sia morto en 1992.

Poste *Douglas Draper* ĉefe zorgis pri la projekto. Enretigis ĝin en februaro 2006 *Andrej Grigorjevskij* <reto@uea.org>.

La artikoloj mem ne estas troveblaj en la reto, sed oni povas serĉi ilin en la ekzistantaj Esperanto-bibliotekoj, i.a. en la Biblioteko Hector Hodler de UEA, kiu cetere plenumas mendojn pri kopiado kaj sendado de artikoloj el malnovaj jarkolektoj.

La katalogo neniel estas kompleta, sed tamen estas pli ol nenio. Estonte estas planate ebligi al la uzantoj memstare aldoni novajn enskribojn.

#### Pri Dewey-sistemo, uzata en la katalogo:

La vaste uzata dekuma klasifika sistemo estis originale elpensita de la usonano *Melvin Dewey* en 1873. Laŭ ĝi oni asignas triciferan numeron + eventuale decimalojn por indiki temon de libro aŭ artikolo.

#### La ĉefkategorioj estas:

- 000 Ĝeneralaĵoj
- 100 Filozofio
- 200 Religio
- 300 Socio, Politiko
- 400 Lingvoj kaj lingvistiko
- 500 Sciencoj
- 600 Aplikataj sciencoj
- 700 Arto, ŝatokupoj
- 800 Pri literaturo
- 900 Geografio, Historio

#### Speciale interesaj subtemoj povas esti:

- Bibliografio 010
- Paco 172
- Esperanto 499.992
- Esperanto-literaturo 899.992
- Vojaĝado 910
- Biografioj 920

Jen la ligo: <http://www.uea.org/dokumentoj/artikoloj.php> (04.09.2014)

## **5 El universitatoj kaj altlernejoj**

### **5.1 Novaĵoj el la Interlingvistikaj Studoj de UAM 2014**

1) Aperis la revuo JKI 2013 (*Język. Komunikacja. Informacja, Lingvo. Komunikado. Informado* – lingvistika revuo el la Lingvistika Instituto de UAM) kun 4 artikoloj, kiuj tuŝas interlingvistikon aŭ esperantologion: *Stefano Keller* kun *Tove Skutnabb-Kangas* pri lingvaj rajtoj kaj UEA (angle), *Ida Strida* pri klasifiko de artefaritaj lingvoj (angle), *Katarzyna Wojan* pri pola-esperanta leksikografio (pole), *Goro Kimura* pri komunikadaj strategioj ĉe la germana-pola landlimo (pole), krome recenzo de *Ilona Koutny* pri la festlibro al *Detlev Blanke* (2011, red.) kaj ŝia prezento de la Interlingvistikaj Studoj (angle) (kp. 4.1).

Ankaŭ la antaŭaj 3 numeroj, ekde kiam *Ilona Koutny* estas kunredaktoro, entenas anglajn kaj polajn artikolojn pri interlingvistiko; krome aperas ankaŭ esperantaj resumoj. La revuo legeblas ankaŭ en la retejo de la revuo: <http://jki.amu.edu.pl> (vd. la „Aktualan Bibliografion 4).

Kontribuojn (angle aŭ pole) por la sekva numero, JKI 2014 sendu al: [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl) ĝis la 30.09.2014!

2) *Ilona Koutny* prelegis dum la internacia konferenco **PLM** (Poznan Linguistic Meeting) en aŭgusto 2013 pri la komplekseco de esperanto (*Can complexity be planned?*).

3) *Ida Strida* (doktoriĝantino en la Lingvistika Instituto de UAM) prelegis pri *Artificial vs Natural – the Case of Esperanto* kadre de la internacia Young Linguistic meeting in Poznan en aprilo.

4) *Marc Bavant*, diplomiĝinto de la Interlingvistikaj Studoj, sukcese defendis sian **doktoran disertaĵon** en la Amsterdama Universitato en aprilo 2014. Por komenci la doktoran procezon la bazo estis la interlingvistika diplomo.

5) La 2-an de majo 2014 okazis franclingva **konferenco** pri aglutineco en la Universitato de Lauzano (Svislando), kunorganizita far *Sébastien Moret*, esploristo de la universitato kaj diplomiĝanta studento de la Interlingvistikaj Studoj. Li prelegis pri lingva simpleco kaj aglutina penso laŭ rusaj esperantistoj en la jaroj 1920-aj. *Ilona Koutny* prelegis pri natura kaj planita aglutineco (komparante la hungaran lingvon kaj esperanton). Krome pluraj el la aliaj prelegantoj menciis esperanton en sia prelego.

*Ilona Koutny*, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, prelegis pri la **graveco de universitata instruado de interlingvistiko kaj esperantologio** kaj pri la modelo de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kadre de la studsemajnfino de CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia), en La Chaux-de-Fonds (Svislando), la 3-an de majo 2014. Parto el la prelego atingeblas sur la retpaĝoj de CDELI dank' al *Stefano Keller*. La invito rigardeblas ankaŭ ekde 17.06.14 en la Esperanta Televido kaj aŭskulteblas ekde 23.06.14 en la retradio Muzaiko. Ĝi spekteblas ankaŭ sur la retpaĝoj de la Studoj (vidu sube).

6) La 3-jaraj eksteraj **postdiplomaj studoj pri interlingvistiko kaj esperantologio** estas simile postulemaj kiel filologioj de aliaj lingvoj. La **120 ETCS-poentoj** (same kiel por 2-jaraj magistraj studoj) estis konfirmitaj per la Fakultata Konsilio de Novfilologio de UAM en majo. Studentoj de aliaj universitatoj povus profiti el tio.

Kandidatoj el la tuta mondo estas atendataj por la nova grupo, kiu startos en septembro 2014. Kiel kutime, ESF disponigas kelkajn stipendiojn por la unika studebleco.

Dum la sesio finekzameniĝos la nuna grupo (inter ili 3 brazilanoj) post trijara serioza laboro, prezentante siajn diplomlaboraĵojn.

7) La Interlingvistikaj Studoj organizas ĉi-jare sian trian internacian interlingvistikan **simpozion**. La ĉefa temo estos *Problemoj de internacia lingva komunikado kaj iliaj solvoj*. Prelegoj pri la sekvaj temoj estas bonvenaj (en esperanto, angla aŭ pola):

- naturaj lingvoj en internacia komunikado,
- lingvopolitiko en plurkulturaj kaj -lingvaj landoj,
- Esperanto:
  - lingvistiko; modelo por analizi lingvajn kategoriojn kaj interlingvaj komparoj,
  - literaturo kiel portanto de internaciaj valoroj kaj temoj,
  - instruado; la lernfaciliga rolo por aliaj lingvoj,
  - Esperanto-movado kiel movado por lingvaj rajtoj,
- aliaj internaciaj helplingvoj,
- lingvaj utopioj kaj artaj lingvoj.

Pli da detaloj koncerne la studojn kaj la simpozion troveblas en la **retpaĝoj de la Interlingvistikaj Studoj** (<http://www.amu.edu.pl/~interl/>). Ekfunkciis ankaŭ **Facebook-paĝo** de la Studoj (<https://www.facebook.com/interlingvistikajstudoj.poznan>).

*Iлона Koutny*

## **5.2 Universitato de Duisburg-Essen: Marcos Cramer pri planlingvoj**

De la 9-a ĝis la 13-a de Septembro 2013 *Marcos Cramer* gvidis intensan seminarion en la Universitato de Duisburg-Essen sub la titolo „Sprachplanung und Plansprachen“ (lingvoplanado kaj planlingvoj). Duono de la seminario temis pri neplanlingva lingvoplanado kaj duono pri planlingvoj.

La parto pri neplanlingva lingvoplanado inkluzivis teoriajn aspektojn de lingvoplanado (interalie laŭ la verko “Language Planning and Social Change” de Robert Cooper (1989)). Krome, ĝi pritraktis multajn realajn ekzemplojn analizitajn laŭ la priparolataj teoriaj modeloj, interalie la “reviviĝon” de la hebrea, la grekan lingvokverelon, la norvegan lingvan situacion kaj la historion, nuntempan laboron kaj (malmultan) influon de lingvaj Akademioj.

La parto pri planlingvoj konsistis trione el superrigardo pri la plej gravaj planlingvoj kaj ilia klasado laŭ diversaj kriterioj (interalie laŭ “Internationale Plansprachen” de Detlev Blanke [1985]) kaj du-trione temis pri Esperanto: skizo de ĝiaj lingvaj ecoj, skizo de ĝia historio kaj nuna stato, kaj relative detala prezento de la historio kaj nuna stato de la Akademio de Esperanto. Komparante la ĝeneralan lingvoplanadon kaj la situacion de Esperanto, Kramer prezentis la tezon, ke post la relative lingvoplanad-intensa komenca periodo, Esperanto ne estis influita de lingvoplanado pli ol mezuma nacia lingvo.

Partoprenis komence 11 kaj fine 9 studentinoj (neniu vira studento), preskaŭ ĉiuj de filologiaj fakoj (latinida, germana kaj nederlanda filologio) kaj unu studentino de teologio. Kvin studentinoj verkis seminari-laboraĵojn, ĉiuj pri temoj el la neplanlingva lingvoplanado.

## **5.3 Bakalaŭra disertacio pri „artefaritaj lingvoj“ de *Blanka Ĉapkova***

*Ĉapková, Blanka (2013): Umělé jazyky: Poznámky k typologii vybraných umělých jazyků. Masarykova Universita, Filosofická fakulta. Ústav jazykověda baltistiky, obecná jazykověda. (Artefaritaj lingvoj: rimarkoj pri la tipologio de elektitaj lingvoj). Masaryk-Universitato, Filozofia Fakultato, Instituto pri Baltistiko kaj Ĝenerala Lingvistiko. Gvidanto de la laboraĵo: Phdr. Ondřej Šeřčík, Ph.D., 62 p.*

## **6 Scienca Revuo en la reto**

La *Internacia Scienca Asocio Esperantista* (ISAE) ĵus havebligis ampleksan arkivon de sia periodaĵo *Scienca Revuo*. Ekde nun haveblas senpage en la Interreto pli ol 60 jaroj de arkivaĵoj, t.e. ĉirkaŭ 2000 artikoloj, kiuj aperis dum la jaroj 1949-2014. Aperintaj artikoloj estis skanitaj kadre de kunlaboro inter ISAE kaj la *Interkultura Centro Herzberg* (ICH, <http://ic-herzberg.de>). Ili haveblas en PDF-formo laŭ la permesilo CC BY-ND. Serĉilo en la retejo ebligas al oni trovi artikolon laŭ ekzemple verkanto de la artikolo aŭ titolo. La arkivo atingeblas per la sekva ligilo: <https://sciencarevuo.info/issue/archive>

Eldonita de ISAE, *Scienca Revuo* estas grava kaj tradicia periodaĵo priscienca en Esperanto. Ĝi publikigas sciencajn artikolojn en Esperanto, kovrantajn ĉiajn fakojn kaj flanke de la scienca enhavo ankaŭ enhavas sekcion pri terminologio, pri scienco kaj socio kaj pri la rilato inter scienco kaj Esperanto. *Scienca Revuo* aperas ekde 1949 kaj estas daŭrigo de revuo fondita en 1904 kiel *Internacia Scienca Revuo*.

ISAE fondiĝis en la jaro 1906 kaj estas la unua esperantlingva asocio, en kiu fakuloj el ĉiuj sciencaj kampoj, profesiaj aŭ amatoraj, kaj interesatoj pri sciencaj aferoj unuiĝis al mondvasta scienca asocio, uzantaj la internacian lingvon Esperanto en scienco kaj teĥniko. Ekde 2013 ISAE estas oficiale registrita kiel asocio ĉe la Nederlanda komerca ĉambro, kun sidejo en Roterdamo.

ISAE daŭre serĉas verkantojn kaj prov-legantojn por diversaj fakoj. Kiu emus fake verki aŭ alimaniere subteni la scienca agadon de la asocio vizitu la paĝon:

<https://scienca-revuo.info/about/journalSponsorship>

#### La Estraro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

José Antonio Vergara (CL)

Johannes Mueller (DE)

Mélanie Maradan (CH)

Francesco Maurelli (UK)

Alga Guernieri (IT)

## **7 Necesas fakaj artikoloj pri Esperanto en naciaj lingvoj**

*Humphrey Tonkin skribis:*

„Kiam interesatoj petas nin pri aŭtoritataj informoj pri Esperanto kaj interlingvistiko, ni ofte ne scias kien sendi ilin, krom al Vikipedio. Tamen, en multaj lingvoj ekzistas tiaj artikoloj en respektataj fakaj kaj ĝeneralaj enciklopedioj. En kelkaj kazoj, tiuj enciklopedioj troviĝas en la reto, sed ofte temas nur pri paperaj verkoj.

Ŝajnas al ni bona ideo fari etan liston de tiaj artikoloj en la diversaj lingvoj, kiun ni povus poste cirkuligi kaj ankaŭ listigi en la reto. Se vi scias pri bonkvalitaj enciklopediaj artikoloj en via lingvo, aŭ mem verkis ilin, bonvolu sendi al ni koncernajn bibliografiajn informojn, kiujn ni aldonos al listo publikigota en IpL.“

#### Jen sekvas eta listo de tiaj artikoloj:

2012. *Invented Languages in Language Policy and Planning*. En: Carol A. Chapelle, red. *The Encyclopedia of Applied Linguistics*. 10 volumoj. Oxford: Wiley-Blackwell.

2012. *Esperanto Poetry*. En: Alex Preminger kaj T. V. F. Brogan, red. *New Princeton Encyclopedia of Poetry and Poetics*. Reviziita eldono. Princeton: Princeton University Press. 457-458.

2009. *Esperanto* (pĝ. 344-345) + *Pidgins and Creoles* (pĝ. 834-837) + *Language* (pĝ. 633-639). Ĉiuj en: Akira Iriye kaj Pierre Yves Saunier, red. *The Palgrave Dictionary of Transnational History*. 8 volumoj. London: Palgrave Macmillan.

2008. *Esperanto*. En: Peter N. Stearns, red. *Oxford Encyclopedia of the Modern World*. 8 volumoj. New York: Oxford University Press.

2006. *Esperanto + World Language Systems + Language*. Ĉiuj en: Roland Robertson kaj Jan Aart Scholte, red. *Encyclopedia of Globalization*. 4 volumoj. London & New York: Routledge.

2006. *Esperanto*. En: John Merriman kaj Jay Winter, red. *Europe Since 1914: Encyclopedia of the Age of War and Reconstruction*. New York: Charles Scribner's Sons.

## **8 Interlingvistika Fonduso de CED (CED-Fonduso)**

### **Interlinguistics Fund**

The Interlinguistics Fund is administered by the Center for Research and Documentation on World Language Problems and funded by the Esperantic Studies Foundation (ESF).

It provides small grants for interlinguistics-related publications, conferences, and similar activities.

Applications for funding should be sent, in either English or Esperanto, to *Dr. Detlev Blanke*, the chair of the selection committee. Applications should, broadly speaking, follow the same format and cover the same ground as those for ESF Research Grants. Interlinguistics Fund grants are normally for \$2000 or less, though exceptions can be made.

Typical activities funded by the Interlinguistics Fund include

- (a) support for publications in any language in the fields of interlinguistics and Esperanto studies (the term “publications” is intended to cover both conventional publications and electronic publications),
- (b) making available to researchers significant materials currently unavailable or insufficiently available,
- (c) travel grants for research or participation in conferences where such grants will lead to publishable projects,
- (d) support for the teaching of interlinguistics and Esperanto studies in universities and equivalent institutions. In general, open-ended projects are less likely to be funded than projects with a specific goal or product.

For more information about the Fund and the procedures for a grant application write to  
detlev@blanke-info.de

(Laŭ informoj de : <http://esperantic.org/en/> )

## **Interlingvistika Fonduso**

La Interlingvistika Fonduso (Interlinguistics Fund) estas administrata de Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj financata de Esperantic Studies Foundation (ESF). Ĝi disponigas malgrandajn financajn subvenciojn/stipendiojn por publikaĵoj, konferencoj kaj similaj aktivaĵoj en la kampo de interlingvistiko.

Petojn pri subvencio oni direktu en la angla lingvo aŭ en Esperanto al *d-ro Detlev Blanke*, la gvidanto de la propon-komitato. La subvencio povas ampleksi maksimume 2000 dolarojn. Ankaŭ povas esti esceptoj.

Al la aktivaĵoj, ĝenerale subvenciataj kadre de la Interlingvistika Fonduso, apartenas

- (a) publikaĵoj en ĉiu ajn lingvo pri interlingvistiko kaj esperantologio (‘publikaĵo’ povas esti konvencia aŭ elektronika),
- (b) al esplorantoj disponigo de gravaj materialoj, ankoraŭ tute ne aŭ nesufiĉe alireblaj,
- (c) kadre de la projektoj esplorvojaĝoj aŭ partopreno en konferencoj kun rezultigo de publikaĵoj,
- (d) instruado de interlingvistiko kaj esperantologio en universitatoj aŭ similaj institucioj. Por subvencioj aparte perspektivaj estas projektoj kun konkretaj limdatoj kaj rezultoj.

Pliajn informojn pri la Fonduso kaj procedoj de peto-starigo donas [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de).  
(Laŭ informoj de <http://esperantic.org/en/>)

## 9 Personaj bibliografioj

### 9.1 Christer Oscar Kiselman

Okaze de la 75-jariĝo de *prof. d-ro Christer Kiselman* en 2013 (do kun iom da malfruo), kaj okaze de lia elekto al la prezidanto de Akademio de Esperanto IpI publikigas informojn pri vivo kaj verko de la konata matematikisto, interlingvisto kaj esperantologo. Aldonajn informojn oni trovos ĉe [www2.math.uu.se/~kiselman/](http://www2.math.uu.se/~kiselman/)

#### 9.1.1 Vivo kaj kariero

##### **Persone**

Naskiĝinta en Stokholmo 1939-04-08 kiel Christer Oscar Svensson. Familia nomo ŝanĝita al Kiselman 1962-08-06.

Filoj: Dan, Ola; filino: Vanda; baptofilino: Déborah; nepino: Klara; nepoj: Joakim, Edvin, Svante, Henning, Jakob.

##### **Eduko**

Abiturienta diplomo 1957-05-11. Universitata diplomo pri matematiko, teoria filozofio kaj astronomio 1958-07-01. Militista servo kiel asista meteorologo en la Reĝa sveda aerarmeo 1959-06-09 – 1960-07-09.

Doktoriĝo kaj docentiĝo (responda al dr. habil. en iuj landoj) pri matematiko ĉe Stokholma universitato 1966.

Universitataj studoj pri la persa lingvo 2008 – 2009. Lingvoj kaj literaturo en la Meza Oriento, Centra kaj Suda Azio 2009. La religioj, historio kaj kultura historio de Hindio 2010. La invento, evoluigo kaj uzo de skribo 2010. Fruaj lingvoj 2010. Klasika greka 2010 – 2011.

##### **Profesia sperto**

Asistanto kaj asista instruisto pri matematiko 1961 – 1965. Membro, Institute for Advanced Study, Princeton, NJ, Usono, 1965-07 – 1966-06. Profesoro vizitanta, Universitato de Nico, Francio, 1967-10 – 1968-09. Profesoro asista, Upsala universitato ekde 1968-04-01. Invitoj kiel profesoro vizitanta al pluraj universitatoj en Francio 1976 – 1991, entute dum sep monatoj.

Plenrajta katedra profesoro ekde 1979.

Profesoro emerita ekde 2006.

##### **Konsilado pri disertado**

Konsilinto de dek sep personoj al doktoreco pri matematiko, 1974 – 2011.

##### **Honora doktoreco, membreco en ordeno**

Doktoro Honoris Causa, Universitato Paul Sabatier, Tuluzo 2000. Oficiro de la Nacio Ordeno de Merito, Francio, ekde 2002. Honora membro de AIS-Bulgario ekde 2013.

##### **Membreco en kleraj societoj**

Reĝa akademio de artoj kaj sciencoj, Upsalo, ekde 1983. Reĝa societo de sciencoj, Upsalo, ekde 1984. Internacia Akademio de la Sciencoj, San Marino, ekde 1984. Internacia Scienca Akademio Comenius ekde 1986. Akademio de Esperanto ekde 1989. Reĝa sveda scienca



akademio ekde 1990. Polska Akademia Umiejetności (Pola Akademio de Kapabloj) ekde 2002. Membro asociita en la Skandinavia societo por iranaj studoj ekde 2010.

### **Komisioj**

Direktoro de la Matematika instituto, Upsala universitato 1971 – 1975 kaj 1977.

Vicprezidanto de la Internacia Scienca Asocio Esperantista 1986 – 1993. Ĝenerala sekretario de la Internacia Scienca Akademio Comenius ekde 1986. Scienca direktoro de Instituto Mittag-Leffler, Djursholm, Svedio 1987-09 – 1988-06.

Komisiita 1991 – 2001 de Sennacieca Asocio Tutmonda revizii kune kun H. S. Holdgrün la matematikajn terminojn en La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2002). Komisiita 1995 – 1996 de Sennacieca Asocio Tutmonda revizii kune kun Ingemar Kaj la statistikajn terminojn en La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2002).

Prezidanto de la estraro de la Instituto Mittag-Leffler 1997 – 2003. Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto 1998 – 2004. Partopreninto en la Interregistara konferenco pri kultura politiko por evoluo, organizita de UNESKO (reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio kaj la Internacia Akademio de Sciencoj, San Marino) 1998. Prezidanto de la Sveda nacia komitato pri matematiko 1998 – 2002. Membro de la Referenca grupo por la matematiko ĉe Internacia scienca programo ekde 2002. Membro de la Nacia delegacio pri matematiko, nomumita de la registaro de Svedio 2003 – 2004.

Rektoro de la 56-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, Gotenburgo 2003. Sekretario de la Komisiono pri la Internacia kongresa universitato (Vilno, Florenco, Jokohamo) 2005 – 2007. Rektoro de la 64-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, Kopenhago 2011. Prezidanto de Akademio de Esperanto ekde 2013-10-05. Membro de la estraro de Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ekde 2013-10-20.

### **Organizado de konferencoj rilataj al lingvoj (elekto)**

Organizinto de la Internacia Simpozio pri Lingva Planado kaj Leksikologio, ISLPL 2001, okazinta en Zagrebo, Kroatio, 2001-07-28 – 30. Organizinto de la Simpozio pri interkultura komunikado, okazinta en Gotenburgo, Svedio, 2003-08-02 – 03. Organizinto de la Esperantologiaj konferencoj en Bjalistoko 2009 kaj Havano 2010; kune kun Mélanie Maradan en Hanojo 2012 kaj en Rejkjaviko 2013.

## **9.1.2 Bibliografio (elekto)**

### ***Verkoj pri matematiko (elekto)***

02-1. A semigroup of operators in convexity theory. Transactions of the American Mathematical Society 354 (2002), 2035--2053.

03-1. La geometrio de la komputila ekrano. En: Internacia Kongresa Universitato, pp. 1--12. (Red. Michela Lipari.) Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2003. 83 pp.

04-1. Convex functions on discrete sets. En: Combinatorial Image Analysis. 10th International Workshop, IW CIA 2004; Auckland, New Zealand, December 1--3, 2004; Proceedings. R. Klette and J. Zunic (Red.), pp. 443--457. Lecture Notes in Computer Science 3322 (2004).

05-1. Functions on discrete sets holomorphic in the sense of Isaacs, or monodiffic functions of the first kind. Science in China, Series A, Mathematics, 48 Supplement (2005), 86--96.

05-2. Subharmonic functions on discrete structures. En: Harmonic Analysis, Signal Processing, and Complexity. Festschrift in Honor of the 60th birthday of Carlos A. Berenstein, pp. 67--80. Progress in Mathematics, Vol. 238. Irene Sabadini, Daniele C. Struppa, David F. Walnut, Red., 2005, xi + 162 pp. Bostono, Baselo, Berlino: Birkhäuser.

07-1. Enkonduko al distribucioj. Acta Sanmarinensia, Vol. VI, No. 4, pp. 105--132 (2004). Academiae Internationalis Scientiarum (AIS). Göttingen: Leins Verlag, 2007.

- 08-1. Minima locaux, fonctions marginales et hyperplans séparants dans l'optimisation discrète. Comptes Rendus de l'Académie des Sciences Paris, Sér. I 346, 49--52.
- 08-3. Functions on discrete sets holomorphic in the sense of Ferrand, or monodiffic functions of the second kind. Science in China, Series A, Mathematics, April 2008, 51, No. 4, 604--619.
- 09-2. Frozen history: Reconstructing the climate of the past. En: Alberto Cialdea; Flavia Lanzara; Paolo Emilio Ricci (Red.), Analysis, Partial Differential Equations and Applications. The Vladimir Maz'ya Anniversary Volume, pp. 97--114. Series: Operator Theory, Advances and Applications, vol. 193. Baselo; Bostono; Berlino: Birkhäuser.
- 10-2. Inverses and quotients of mappings between ordered sets. Image and Vision Computing 28 (2010), 1429--1442.
- 10-4. Christer O. Kiselman; Shiva Samieinia. Convexity of marginal functions in the discrete case. En: Shiva Samieinia (2010), Digital Geometry, Combinatorics, and Discrete Optimization, publikigita 2010-12-15. Doktora disertaĵo defendita ĉe Stokholma universitato 2011-01-21.
- 11-1. Characterizing digital straightness and digital convexity by means of difference operators. Matematika 57 (2011), 355--380.
- 11-3. Analytic continuation of fundamental solutions to differential equations with constant coefficients. Actes du colloque "Analyse Complexe et Applications" en l'honneur de Nguyen Thanh Van. Annales de la Faculté des Sciences de Toulouse, Mathématiques, (6), 20, Fascicule Spécial, 153--182.
- 12-1. Questions inspired by Mikael Passare's mathematics. Afrika Matematika 2012.
- 12-2. Diskreta kaj reela optimumado. En: Prelegaro, Parto II. Internacia Simpozio „Apliko de Esperanto en la profesia agado“, 2012, pp. 72--84. Karlovo: Akademio Internacia de la Sciencoj. (Teksto bazita sur prelego en Karlovo 2009-06.)
- 14-1. Kiel rekoni rektajn kaj strekajn inter ĉiuj kurboj kaj aliaj bildoj sur la komputila ekrano? En: Prelegaro, Volumo II. Internacia Simpozio „Apliko de Esperanto en la profesia agado“ 2013, pp. 72--92. Karlovo: Akademio Internacia de la Sciencoj. (Teksto bazita sur prelego en Sopot 2010-06-12.)

### ***Lingvistikaj verkoj en aŭ pri Esperanto (elekto)***

- 01-a. La sveda faklingvo en tekniko, matematiko kaj natursciencoj. En: Fiedler, Sabine; Liu Haitao (Red.): Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zur Interlingvistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag, pp. 40--56. Dobrichovice (Prago): Kava-Pech, 2001.
- 01-b. Kreado de matematikaj terminoj. En: Christer Kiselman; Geraldo Mattos (Red.): Lingva Planado kaj Leksikologio. Language Planning and Lexicology, pp. 173--187. Publikigaĵo de internacia simpozio en Zagrebo, 2001 07 28--30. Chapecó-SC: Fonto, 2001, 286 pp.
- 08-a. Esperanto: its origins and early history. En: Prace Komisji Spraw Europejskich PAU. Tom II, pp. 39-56. Red. Andrzej Pelczar. Krakovo: Polska Akademia Umiejetności, 2008, 79p
- 11-a. Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. Esperantologio / Esperanto Studies 5 (2011), 79--149.

### ***Bibliografio: aliaj verkoj en Esperanto (elekto)***

- 09-i. Antaŭparolo. En: Renato Corsetti (Red.), Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo. Aktoj de la studtago en la universitato de Florenco 28-a de julio 2006, pp. 7--8. Akademio de Esperanto. Pisa: Edistudio. 2008 [2009]. 127 pp.
- 12-ii. Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo. En: Blanke, Detlev (Red.), Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011, pp. 19--33. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

### ***Bibliografio: pri aliaj lingvoj (elekto)***

- 01-c. Svenskt fackspråk inom teknik, matematik och naturvetenskap [La situacio de la sveda en la kampoj de tekniko, matematiko kaj naturaj sciencoj]. Libens Merito. Festskrift till Stig Strömholm, pp. 225--243. Acta Academiae Regiae Scientiarum Upsaliensis 21 (2001).
- 08-b. Christer Kiselman; Lars Mouwitz. Matematiktermer för skolan [Matematikaj terminoj por la lernejo]. Gotenburgo: Gotenburga universitato, Nacia centro por matematika edukado (2008). 312 p.
- 08-c. Språkens rikedomar och terminologins problem [La trezoroj de la lingvoj kaj la problemoj de la terminologio]. En: Kiselman & Mouwitz (2008:287--292).

### ***Redaktado rilata al Esperanto (elekto)***

- Esperantologio / Esperanto Studies, kajeroj 1--6 (1999--2013).
- Redaktinto kune kun Geraldo Mattos de Language Planning and Lexicology, Proceedings of an international symposium held in Zagreb, July 28--30, 2001. Chapecó, SC (Brazilo): Fonto, 2001.
- Symposium on Communication Across Cultural Boundaries; Simpozio pri interkultura komunikado, Gotenburgo 2003. 157 p. Dobrichovice (Czechia): KAVA-PECH, 2005.
- Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono. Aktoj de la 32-a Esperantologia Konferenco en la 94-a Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko, 2009. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio 2010.
- Esperanto, komenco, aktuala kaj estonteco. Aktoj de la 33-a Esperantologia Konferenco en la 95-a Universala Kongreso de Esperanto, Havano 2010. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio 2011.
- Redaktinto kune kun Mélanie Maradan de Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo 2012. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio 2013.

(La ciferoj kaj literoj antaŭ la bibliografiaj eroj devenas el la kompleta bibliografio de Christer Kiselman. Ni ricevis de li nur elekton.)

## **9.2 Marcos Cramer**

Marcos Cramer, membro de Akademio de Esperanto doktoriĝis en 2013. Pro tio ni gratulas kaj prezentas kelkajn informojn pri li.

### **9.2.1 Biografiaj informoj**

Markos Kramer (nacilingva ortografio: Marcos Cramer) naskiĝis en 1984 en Bonaero (Buenos Aires, Argentino) kaj kreskis ĉefe en Germanujo. De 2003 ĝis 2007 li studis matematikon kaj filozofion en Oksfordo (Britujo). De 2008 ĝis 2013 li doktoriĝis pri matematiko en Bonno (Germanujo) analizante la matematikan faklingvon per logikaj kaj lingvosciencaj metodoj. Ekde 2013 li laboras kiel scienca kunlaboranto en la komputoscienca fakto de la Universitato de Luksemburgo, okupiĝante pri logikoj kun komputosciencaj aplikoj.

Kramer eklernis Esperanton en 2000. De 2001 ĝis 2006 li aktivis en la Germana Esperanto-Junularo kiel interreta respondeculo kaj poste kiel estro de la Interreta Komisiono. De 2006 ĝis 2009 li estis la redaktisto de „TEJO Tutmonde“, dumonata membrogazeto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ekde 2010, Kramer membras en la Akademio de Esperanto, kaj de 2013 li estas la direktoro de ĝia Sekcio pri Ĝenerala Vortaro.

## 9.2.2 La doktora disertacio.

Marcos Cramer (2013): *Proof-checking mathematical texts in controlled natural language*. Universitäts- und Landesbibliothek Bonn, 370 p.

Publikigita en la reto: <http://hss.ulb.uni-bonn.de/2013/3390/3390.htm>

(Titolo: „Pruvkontrolado de matematikaj tekstoj en reguligita natura lingvo.”)

La esplorprojekto, ene de kiu estis farita la esploro por ĉi tiu disertaĵo, celas la kreadon de komputila programo, kiu povas kontroli la ĝustecon de matematikaj pruvoj verkitaj en reguligita natura lingvo, do en subaro de la natura lingvo difinita per formala gramatiko. Ni kreis prototipon de tia programo nomitan la *Naproche*-sistemo (prononco: napróš). La disertaĵo priskribas la novspecajn logikajn kaj lingvosciencajn teoriojn bezonatajn por difini kaj motivigi la reguligitan naturan lingvon kaj la pruvkontrolan algoritmon de la *Naproche*-sistemo.

### Inter ĉi tiuj teorioj estas

- nova matematikfundamenta teorio de funkcioj, kiu pro sia analogeco al la Ackermann-a Aroterio nomiĝas *Ackermann-eca Funkcoteorio*,
- pli-altnivela vastigo de la Dinamika Predikat-Teorio kapabla modeligi la fenomenon de implicita dinamika funkci-enkonduko, ekzemplita de konstruoj de la formo „por ĉiu  $x$  ekzistas  $f(x)$  tia, ke ...”, kaj
- apliko de la teorio de antaŭsupozoj al la matematika faklingvo.

## 9.2.3 Publikaĵoj

Modelling implicit dynamic introduction of function symbols in mathematical texts. In: Moss, L. (ed.) *Proceedings of Second Workshop on Natural Language and Computer Science* (2014).

Modelling the usage of partial functions and undefined terms using presupposition theory. In: Geschke, S., Löwe, B., Schlicht, P. (eds.) *Infinity, Computability and Metamathematics – Festschrift celebrating the 60th birthdays of Peter Koepke and Philip Welch*, pp. 71–88. College Publications (2014).

Proof-checking mathematical texts in controlled natural language. Ph.D. thesis, University of Bonn (2013).

Implicit dynamic function introduction and its connections to the foundations of mathematics. In: Prosov, O. (ed.) *Proceedings of the International interdisciplinary conference on Philosophy, Mathematics, Linguistics: Aspects of Interaction (PhML 2012)*. pp. 35–42 (2012).

kun Schröder, B.: Interpreting Plurals in the Naproche CNL. In: Rosner, M., Fuchs, N.E. (eds.) *Controlled Natural Language, LNAI 7175*. pp. 43–52. Springer (2012).

kun Koepke, P., Schröder, B.: Parsing and Disambiguation of Symbolic Mathematics in the Naproche System. In: Davenport, J., Farmer, W., Rabe, F., Urban, J. (eds.) *Intelligent Computer Mathematics, LNAI 6824*. pp. 180–195. Springer (2011).

Komputlingvosciencia kaj logika analizado de matematikaj tekstoj. In Baláž, P., Nosková, K. (eds.) *Modernaj teknologioj por Esperanto – Prelegkolekto el KAEST 2010*. pp. 60–69. Espero (2011).

kun Kühlwein, D., Schröder, B.: Presupposition Projection and Accommodation in Mathematical Texts. In: Pinkal, M., Rehbein, I., Schulte im Walde S., Storrer, A. (eds.) *Semantic Approaches in Natural Language Processing: Proceedings of the Conference on Natural Language Processing 2010 (KONVENS)*. pp. 29–36. Universaar (2010).

kun Fisseni, B., Koepke, P., Kühlwein, D., Schröder, B., Veldman, J.: The Naproche Project – Controlled Natural Language Proof Checking of Mathematical Texts. In: Fuchs, N.E. (ed.) *Controlled Natural Language, LNAI 5972*. pp. 170–186. Springer (2010).

kun Koepke, P., Kühlwein, D., Schröder, B.: Premise Selection in the Naproche System. In: Giesl, J., Hähnle, R. (eds.) *Automated Reasoning, LNAI 6173*. pp. 434–440. Springer (2010).

kun Kühlwein, Koepke, P., Schröder, B.: The Naproche System. In: Dixon, L., Carette, J. (eds.) *Calcuemus 2009 Emerging Trends*. pp. 8–18 (2009).

Mathematisch-logische Aspekte von Beweisrepräsentationsstrukturen (2009), thesis for qualifying as a doctoral student at the University of Bonn; available at <http://www.naproche.net/downloads/2009/cramer-master.pdf>.

### **9.3 Ignat Florian Bociort okaze al la 90-a naskiĝtago**

Okaze de la 90-jariĝo de *prof. d-ro Ignat Florian Bociort* ni prezentas kelkajn faktojn pri li (i.a. laŭ Vikipedio ([http://eo.wikipedia.org/wiki/Ignat\\_Florian\\_Bociort](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ignat_Florian_Bociort))).

#### **9.3.1 Vivo kaj verko**

Prof. Bociort ekde komence de la 1990aj jaroj vivas kaj agadas en Berlino, ne laste pro kaj kun sia same aktiva germana edzino Ursula, rumanistino, kiu ankaŭ bone orientiĝas en Esperanto kaj multflanke subtenis kaj daŭre subtenas lian agadon.

La jubileo de la profesoro estas bonvena okazo tre kore gratuli al li kaj deziri al li ĉion bonan por la sekvaj vivo-jaroj. Li konatiĝis pro diversaj prelegoj, publikaĵoj kaj aliaj aktivaĵoj en Rumanio, alilande kaj en Germanio. Tio eĉ reiras ĝis la tempo antaŭ 1990, kiam li laboris en Humboldt-Universitato de orienta Berlin.

La jubileo ankaŭ estu okazo por iom informi pri la sciencisto.

Ignat Florian Bociort naskiĝis 13.10. 1924 en sud-okcidenta Rumanio kaj plenkreskis en mez-kampana familio. Li faris konsiderindan karieron kiel kultursciencisto (specialisto pri estetiko) kaj kiel tia estas estimata en rumanaj sciencistaj rondoj.

Li studis filozofion (1945-1949) kaj filologion (1946-1950) en la Universitato de Bukareŝto kaj doktoriĝis pri filozofio en Humboldt-Universitato de Berlin. Sekvis diversaj profesoraj instru-postenoj en la universitatoj de Bukareŝto (rumana lingvo kaj literaturo), Timiŝoara (estetiko kaj literaturo) kaj Berlino (rumana studoj). I. F. Bociort ankaŭ estas orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino. Li estas membro de kelkaj akademioj. Dum multaj jaroj prof. Bociort kaj lia edzino estis membroj de Gesellschaft für Interlinguistik (Societo pri Interlingvistiko) en Berlin.

La sciencisto estas aŭtoro de pluraj libroj pri estetiko, literatura teorio, interlingvistiko kaj Esperanto (vidu la aldonan liston). Li emeritiĝis en la jaro 1995.

La decidajn impulson por lerni, apliki kaj disvastigi Esperanton li ricevis en (orienta) Berlino dum la 1960aj jaroj.

Post la doktoriĝo en Berlin prof. Bociort hejmenvenis al Rumanio kaj estis ege aktiva en la tiea nacia Esperanto-movado, kiun li tre revigligis. Malgraŭ tre malfavoraj cirkonstancoj dum la tempo de Ceaușescu, kiam la Esperanto-movado estis oficiale malpermesita, li sukcesis akiri laŭleĝan agadkampon por Esperanto en universitataj kaj sciencaj medioj kaj gvidis la rumanian Esperanto-movadon en diversaj postenoj.

Li kuraĝe kaj persiste kontaktis persone pli ol 20 ministrojn kaj aliajn altrangulojn, kiuj ekde tiam ŝirmis la antaŭe malpermesitan agadon. Tiel li sukcesis en 1978 krei la Akademian Kolektivon pri Esperanto kaj Interlingvistiko, kadre de la rumana Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Tiu kolektivo fariĝis grava faktoro por enkonduki Esperanton kiel oficialan, nedevigan studobjekton en ĉiujn filologiajn fakultatojn de la lando kaj estigis Esperanto-sekcion en la rumana Societo pri Filologiaj Sciencoj. Io tia en neniu alia lando de la mondo okazis lige al Esperanto.

Tamen en la jaro 1985 en Rumanio la Esperanto-agado denove estis tute malpermesita kaj li kaj la ĉefaj kunbatalantoj suferis persekutojn.

Prof. Bociort verkis plurajn librojn por la lernado de Esperanto, gvidis la laboron por la apero de rumana-esperanta vortaro kaj zorgis pri apero de kvarlingva konversacia libro ktp. Post la falo de la diktaturo en la fino de la jaro 1989 fondiĝis la longtempe atendata Esperanto-Asocio de Rumanio, kies unua (kaj nuna honora) prezidanto li estas. Pro siaj multaj meritoj prof. Ignat Florian Bociort estas distingita per honora membreco de UEA.

### **9.3.2 Elekta bibliografio de la verkoj de prof. Bociort**

#### **(1) Por lerni la lingvon Esperanto**

- *Curs elementar de Esperanto* (Baza kurso de Esperanto), Timișoara 1978.
- *Curs de gramatica limbii Esperanto* (Gramatika kurso de Esperanto), Timișoara 1980.
- *Lucrări practice de esperanto și interlingvistică* (Praktikaj taskoj por Esperanto kaj interlingvistiko), Timișoara 1980.
- *Antologie de texte pentru seminarul de interlingvistică* (Antologio de tekstoj por interlingvistikaj seminarioj), Timișoara 1982.

#### **(2) Pri la Esperanto-movado**

- *Către tinerii mei cititori. De ce rezumatele în Esperanto? (Al miaj junaj legantoj. Kial la resumojn en Esperanto? En la libro: Estetică literară* (Literatura estetiko), pp. 447–484, Timișoara 1995.
- *Esperanto. Movado, strategio, estetiko, rakontoj*. Timișoara 2007, 652 p.
- *Din băătălia pentru esperanto în România* (Batalo por enkonduko de Esperanto en Rumanion), en la libro: *Convingeri, opinii, atitudini*. (Konvinkoj, opinioj, sintenoj), pp. 442 – 655, Cluj-Napoca 2008.
- *Din polemicle cu interlingviștii* (Pri polemikoj kun interlingvistoj), en la libro: *Confruntări, memorii, povestiri* (Konfrontoj, memoroj, rakontoj), pp. 533 – 610, Cluj-Napoca 2012.

### (3) Pri estetiko de literaturo

- *Teoria progresului literar-artistic* (La teorio de literature-arta progreso), Bukarest 1975, 304 p.
- *Teoria literaturii* (Literaturteorio), Timișoara 1977, 308 p.
- *Estetică literară* (Estetiko de literaturo), 2 vol. , Timișoara 1995, 953 p.
- *Convingeri, opinii, atitudini* (Konvinkoj, opinioj, sintenoj), Cluj-Napoca 2008, 660 p.
- *Estetică literară prin controverse* (Estetiko de literaturo kun kontestoj), Cluj-Napoca 2011, 223 p.
- *Confruntări, memorii, povestiri* (konfrontoj, memoroj, rakontoj), Cluj-Napoca 2012, 666 p.
- *Progresul estetic al literaturii ca problemă a praxeologiei* (La estetika progreso de la literaturo kiel problemo de prakseologio), Cluj-Napoca 2013, 777 p.

(kompilis Detlev Blanke)

## 10 Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto de Bernhard Pabst

Du pdf-dosieroj en formato A4 elŝuteblaj de [www.esperanto-konsultejo.info/bk.htm](http://www.esperanto-konsultejo.info/bk.htm). Signaturo ÖNB, Vieno: 2032345-C.1 (vol. 1) kaj 2032345-C.2 (vol. 2). Berlin: Aŭtoro, 2014.

Unua Parto – *Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro*. [1a eld.] 142 p. (2014-07-07).

Dua Parto – *Vortaro Oficiala*. [3a eld.], 358 p. (2014-06-20).

Ĉiu lingvo havas normojn, regularon, laŭ kiu oni juĝas, ĉu esprimu en tiu lingvo estas „ĝusta“ aŭ „malĝusta“. En naciaj lingvoj ili estas ekzemple ŝtataj preskriboj (leĝoj, reglamentoj) pri ortografio en administrado kaj edukado, akademia vortaro aŭ alia ĝenerale akceptita verko eĉ se de komerca kompanio, aŭ simple la „lingvo-uzo“, kiel ajn oni konstatas ĝin.

La planita kaj diaspora lingvo Esperanto ne havas ŝtatajn instituciojn, kiuj protektas ĝin. Laŭ propono de Zamenhof, la esperantistoj pro tio interkonsentis pri regularo, la „Fundamento“ (1905), kiu garantiu similan, „kvazaŭ-ŝtatan“ protekton. Ĝi enhavas regulojn, modelojn kaj rekomendojn, kiu difinas, kio estas „ĝusta“ Esperanto. Krome ĝi preskribas procedurojn pri la interpretado de siaj reguloj kaj pri sia evoluiĝo (malfermaj klaŭzoj). Fine ĝi kreis lingvajn instituciojn, nuntempe kunfanditajn en la Akademio. Ĉi tiu zorgu pri la unueca uzado de la lingvo kaj konstante plilarĝigu la ĝeneralan interkonsenton pri „ĝusta“ Esperanto per Oficialaj Aldonoj (OA). Lastfoje tio okazis en 2007.

La Fundamento estas ne tute facila legaĵo, kreskinta dum 18 jaroj. Ĝi enhavas partojn el la *Unua Libro* de 1887 (Gramatiko - FG), aliaj de 1893 (*Universala Vortaro* - UV), 1898 (*Ekzercaro* - FE) kaj 1905 (Antaŭparolo pri interpretado, proceduro kaj organizado - A).

Pri kelkaj detaloj la partoj estas malkoheraj (ekz. pri –nj kaj –ĉj). FG kaj UV estas verkitaj en historiaj, ofte ne plu kutimaj franca, angla, germana, rusa kaj pola. Ekzistas nur relative malmultaj, kutime tre koncizaj ekzercoj. Nek ili, nek FG aŭ UV plene klarigas ĉiujn lingvajn demandojn. La Fundamento estas nekompleta. Pro tio la Antaŭparolo kune kun la Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (Bulonja Deklaracio – BD 1905) preskribas kompleksan sistemon de suplementaj fontoj pri „ĝusta“ Esperanto kaj difinas la rilaton inter la reguloj de la Fundamento kaj la suplementaj fontoj (norm-hierarkio). Al ili apartenas precipe la verkaro de Zamenhof kaj la lingvo-uzo de la „bonaj verkistoj“. Aparte grave estas la Lingvaj Respondoj (LR) de Zamenhof, liaj vortaroj kaj lernolibroj (ĉefe la Dua Libro – DL 1888) kaj liaj literaturaj tradukoj.

La naŭ Oficialaj Aldonoj de la Akademio (OA 1909-2007) parte estas verkitaj en pliaj referenc-lingvoj. Nek la naŭ OA, nek aliaj akademiaj decidoj iam estis integritaj en la originan version de 1905 por ekhavi unuecan norm-tekston facile konsulteblan.

La meze de 2014 verkata du-voluma Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto (BK 2012 ss) celas esti konsult-verko pri ĉiuj demandoj ĉirkaŭ la „lingvo-konstitucio“ de Esperanto.

La jam pli-malpli kompletigita Dua Parto (BK II) pri la Vortaro Oficiala (VO) enhavas ĉiujn ĉ. 5000 oficialajn lingvo-elementojn, prezentitajn rigore laŭ la oficialaj fontoj. Ĝi klarigas devenon, signifon kaj dubajn demandojn de kaj pri unuopaj „vortoj“. La nuntempe ankoraŭ tre nekompleta Unua Parto (BK I) prikomentas Antaŭparolon, Gramatikon, Ekzercaron kaj ĉiujn demandojn pri VO, kiuj trapaŝas la sferon de unuopa vorto (ekz. vortgrupojn kiel propraj nomoj, fako-aganto-parojn kiel geologio – geologiisto / geologo, la ekeston de la naŭ OA k.t.p.).

BK celas progresintajn esperantistojn kaj fakulojn, kiuj volas rapide informi sin pri la oficiala stato de unuopaj lingvaj demandoj.

La Fundamento daŭre estas nemalhavebla kaj tre utila bazo por unueca uzado de la lingvo kaj por eltrovi, kio estas „ĝusta“ Esperanto. Ĝiaj principoj estas surprize modernaj kaj „eternaj“. Multaj „aktualaj“ disputoj ekestis fakte jam en ĝia frua epoko antaŭ la unua mond-milito kaj estas daŭrigataj ĝis niatepe per la ĉiam samaj argumentoj, kvankam la solvoj estas relative facile troveblaj per konsekvenca apliko de la Fundamento kaj precipe de ĝiaj interpretaj reguloj en la Antaŭparolo.

Jen nur kelkaj ekzemploj:

Ĉu antaŭvokala „ŭ“? (ne). –

Ĉu aldono de la serio „aliu“, „alio“ k.t.p. al la tabelvortoj (ne). –

Ĉu forigo de la diakritaj literoj? (ne). –

Ĉu kaj kiel esperantigi kiujn proprajn nomojn? (principe jes, laŭ la cirkonstancoj). –

Ĉu formoj kiel Zamenhof kaj Puŝkin estas plene esperantigitaj? (jes) –

Ĉu atismo aŭ itismo? (itismo). –

Kiuj „neologismoj“? (laŭ la „Zamenhofa semaforo“ – fremdvortoj, novaj vortoj, formoj novaj, ĉio alia estas nur rekomendo pri stilo). –

„po“, ĉu adverbo aŭ prepozicio? (prepozicio) – k.t.p.

Simile temas pri historiaj aŭ aktualaj „skoloj“ kiel ekz. la Analiza Skolo, la metagramatika interpretado (Makking) aŭ bonlingvismo.

Eĉ nur ioma kono de la Fundamento facile montras, ke temas pri (partaj) devioj de Esperanto, pri eksterfundamentaj variaĵoj. (Re-) malkovro kaj (re-) popularigo de la Fundamento, de ĝiaj principoj kaj decidoj pri „ĝusta“ Esperanto pro tio estas dezirinda kaj urĝa.

*(bernhard.pabst@gmx.de)*

---

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de). Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas kompilitaj de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. IpI riceveblas laŭpete senpage de CO de UEA .**

---